

N. N. 73,

La virino sen profesio

tradukita de Joachim Gießner

”Sen iu profesio’, eldiras la pasporto.
 Ĉu povas esti vere? Al mi ja mankas vorto.
 Kaj fakte jen mi legas: “Sen iu profesio.
 ”Sed male, evidente utilas ŝi por ĉio.
 Cerbumi nur kaj zorgi, labori por aliaj
 ja estas profesio. Per pensoj, manoj siaj
 matene ŝi komencas ĝis longe en la nokto,
 por l’bono de la siaj. Ŝin ne kontrolas vokto.
 Edzin’, patrin’, mastrino en familia domo
 inkludas profesiojn sennombrajn de la homo.
 Ŝi klare kompetentas tagtage por manĝaĵoj.
 Pakisto ŝi fariĝas por famili-vojaĝoj.
 Kirurgo, se en fingro pikiĝas dorn-doloro,
 juĝisto en kvereloj kaj pro amara ploro.
 Ŝi novtinkturas robojn, mantelojn eluzitajn,
 genie ŝi financas monujojn tro streĉitajn.
 Vivanta leksikono por ĉio en la mondo
 kaj flikas la tolaĵon por ĉiu en la rondo.
 Fabelojn ŝi rakontas, sen nur fariĝi laca,
 kaj daŭre priatentas, ke l’domo estas paca.
 Kuracas pupojn, estas eĉ dekoraciisto,
 prizorgas la ĝardenon, kaj estas jen frizisto.
 Nun tamen la presiston mi ne pli longe plagas,
 ĉar multajn profesiojn ankoraŭ mi imagas
 de inoj, kiujn kreis por l’ben’ de l’homoj Dio.
 Sed diras la pasporto: “Sen iu profesio”.

...

*Traduko de la Germana poemo “Die Frau ohne Beruf” de N. N. 73 en la Germanan de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-939-1888 (2013-11-28 15:22:24)

Pri la tradukinto Joachim Gießner troviĝas informoj en la vikipedia paĝo http://eo.wikipedia.org/wiki/Joachim_Giessner.